Universala Esperanto-Asocio

**Ligoj kun la Ligo ILEI kaj ni**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko: EKO 2016-15 sendita el Les Brenets, Svislando, la 9an de majo.*

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# Edukaj planoj – ILEI kaj UEA kunlabore

Jen unu el la pli gravaj temoj de la ĵus finiĝinta estrarkunsido de ILEI, kiu okazis inter la 5a ĝis la 8a de majo en Les Brenets, okcidente en Svislando. Partoprenis Elena Nadikova (Ĉeboksari, Rusio), Radojica Petrovic (Ĉaĉak, Serbio), kaj gastiganto Mireille Grosjean. Plie ĉeestis Stefan MacGill kiel respondeculo de la rilatoj inter UEA kaj ILEI. Per skajpo la kvar aliaj estraranoj de ILEI el Ameriko, Afriko kaj Azio povis diskuti kun la fizikaj kunvenintoj.

La preparoj por la ĉi-jara Konferenco de ILEI bone evoluas, same la planoj por la venontaj konferencoj. Diskutoj kun MacGill helpis formi kunlaborigan politikon pri UK-oj kaj ILEI-konferencoj. Cele al ebla afrika Konferenco estis decidita seminario de Radojica Petrovic en Senegalo kun instruado de Eo, fortigado de la loka kaj regiona movado, kontaktoj kun instancoj kaj plua esploro de eblaj konferencaj lokoj.

Pri la liga organo «Internacia Pedagogia Revuo» vidiĝas bezono profesiigi la prezenton de fakaj artikoloj komence de la revuo, por ke la aŭtoroj povu uzi tion en sia referenca listo de publikigaĵoj.

La lertigado de instruistoj okupis grandan lokon en la diskutoj. Raporto pri lastaj evoluoj aŭdiĝos en la 49a Konferenco de ILEI en Nyiregyháza. La plej altnivela lertigado okazas en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando per unujara kurso komenciĝonta en septembro 2016 pri kiu sekvos informoj en baldaŭa EKO-komuniko.

Niaj fotoj unu kaj du : Instruistoj transpontas limojn tenante tamen sian ekvilibron; la svisfranca limo pasas inter la piedoj ĉe la strato, kaj pasas meze de la rivero, kiun la ponto deksre transiras.





Gravas same al ILEI kiel al UEA la lanĉo de la **Jaro de la Lernanto.** Eventoj, eldonoj, agadoj formas longan liston. La lanĉo okazos en la Universala Kongreso en Nitra okaze de la Tago de la Lernado marde. ILEI kaj UEA kune starigos portempan komisionon por gvidi kaj sekvi la agadojn – specifa tasko en tiu sekvado estas arigo de la fakaj kontribuoj prezentitaj kadre de la Jaro. Formata estas listo de deko da aranĝoj en tri kontinentoj, kiuj povos kontribui al la markado de tiu jaro. La unua AMO-seminario kun eksplicite eduka temaro eniros la liston.

ILEI, same kiel UEA, sentas bezonon pli proksime sekvi la agadon ene de siaj laborkomisionoj. Agado en brazila universitato cele al interkulturaj rilatoj per modernaj teknikiloj kaj deziro relanĉi la projekton **Interkulturo** figuras ĉe ILEI .

Kontribue al eksteraj rilatoj de ILEI, formiĝas efika tradukreto por ke utilaj dokumentoj povu aperi en lingvoj vaste uzataj en internaciaj edukaj rondoj.

Ene de ILEI pluiras debatoj (same kiel en UEA) kiel malfermi plie la membriĝon al kiel eble plej vastaj tavoloj de la tutmondanaro.

La kunveno konsistis el laboro (26 horoj), kulturo (vizito al CDELI kaj akcepto tie de s-ro Claude Gacond kaj vizito al la horloĝmuzeo de Le Locle), ekskurso (al la dunacia akvofalo Saut-du-Doubs), distro, eksteraj kontaktoj (kun vilaĝanoj), bonveniga akcepto de la prezidanto de la vilaĝa konsilio, klerigo por nova estrarano, kaj ekuzo de skajpado. La kunsidado rezultis en ideoj por raciigita financa planado, elformiĝo de strategioj kaj firmigo de laborkapabla kohera teamo.

490 vortoj.

Raportis Mireille Grosjean kaj Stefan MacGill, la 9an de majo 2016.



La foto tri  montras la vilaĝestron, s-ron Stéphane Reichen maldekstre, kun la tri ĉeestantaj estraranoj de ILEI sur la balkono de la kunsidejo.

Foto kvar  (sekvapaĝe), la ekskursintoj ĉe delonge ornamita roko survoje al la akvofalo Saut-du-Doubs. La regiono havas longan kaj profundan ligiĝon kun Esperanto.

Ĉiuj fotoj de Mireĵlo Grosjean)




## Niaj Aligitaj Membroj ricevos atenton

Aligitaj membroj (AM) estas tiuj, kiuj membras en aliĝinta Landa Asocio de Universala Esperanto-Asocio, sed ne estas Individua Membro de la Asocio. Ene de UEA naskiĝas planoj liveri al ili simplajn perretajn servojn. Ni prezentos la koncernajn planojn en baldaŭa EKO-komuniko.

## Eroj por EKOj

En preparo por baldaŭaj komunikoj estas pli detalaj informoj pri la Jaro de la Lernanto, pri la unujara kurso de Instruista Trejnado (Metodiko) en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano, Pollando, ekde septembro 2016, pri la Universitata kolokvo en Timisoaro, Rumanio, en novembro kaj la 6a Afrika Kongreso de Esperanto en Bunda, Tanzanio en decembro. Kandidatoj por aperigotaj tekstoj ĉiam bonvenas, prefereble jam redaktitaj kaj kun fotoj!

Vortoj entute : 680

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...